# AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia Internazionale delle Scienze

International Academy of Sciences

Internationale Akademie der Wissenschaften

Académie Internationale des Sciences

San Marino

***AKTUALAJ INFORMOJ PRI LA PROGRAMO DE LA***

## 6a itala studadsesio lige al la 21a
## SANMARINA UNIVERSITATA STUDADSESIO
# SUS 21

*sub la patroneco de la Komunumo de Rimini,*
*de la Provinco de Rimini*
*kaj de la Regiono Emilia Romagna*

***pro la alta kultura valoro***

**Rimini • San Marino**

1999.08.28 — 09.03 / 1698–1699 pfR

Sèsta sessione universitaria italiana in collegamento con la ventunesima Sessione Universitaria Sanmarinese

Sechste italienische Studientagung in Verbindung mit der einundzwanzigsten Sanmarinesischen Universitären Studientagung

Sixth italian university session connected with the twenty first Sanmarinian University Session

Sixième séance universitaire italienne liée avec la vingt et unième Séance Universitaire Sanmarinienne

---

*Laborlingvoj · Lingue di lavoro · Arbeitssprachen · Working languages · Langues de travail:*

***la Internacia Lingvo (ILo) · italiano · Deutsch · English · français***

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino dum jam pli ol 15 jaroj donas la eblecon studi en la Internacia Lingvo (Ilo), kiu estas unu el la kvin oficialaj lingvoj de AIS krom la angla, franca, germana kaj itala.

En tiu ĉi jaro AIS okazigos jam la duan Sanmarinecan Universitatan Studadsesion. En ĝia kadro partoprenantoj povas sekvi plurajn kursojn kaj prelegojn el la ses sekcioj de la akademio. Du tagojn antaŭ la komenco de la sciencaj kursoj AIS ofertas tradicie lingvokursojn pri la Internacia Lingvo, laŭbezone por komencantoj, progresintoj, por personoj kun ILo-antaŭkonoj k.s. Jen parto de la scienca programo:

*Kibernetika sekcio*

**Lerninstruado kaj lernstirado** (kurso de OProf. Dr. habil. H. Frank, Paderborn)

*Humanistika sekcio*

**Ĉeneroj por historio de la Esperanto-literaturo** (kurso de OProf. C. Minnaja dr., Padova)

*Strukturscienca sekcio*

**Nombroteoriaj perloj** (kurso de OProf. H. S. Holdgrün dr., Göttingen)

*Filozofia sekcio*

**Devoj kaj Agoj** (prelego de AProf. Dr. H. Angstl, München)

*Naturscienca sekcio*

**Nia Galaksio — La Lakta Vojo** (kurso de OProf. H. M. Maitzen dr., Wien)

*Morfoscienca sekcio*

**Aplikado de aŭdvidaj kaj plurkanalaj rimedoj en instruado** (kurso de OProf. M. Grego, Venezia / ADoc. Mag. A. Lewanderska-Quednau, Gliwice/Freising)

En la kadro de la ĉi-jara studadsesio okazos Simposium Latinum, dum kiu — krom prelegoj — estos ofertata ankaŭ kurso kaj en Esperanto kaj en la latina lingvo de la docentoj Vera Barandowska-Frank kaj Hans-Michael Maitzen pri ***Steloj en la Metamorfozoj de Ovidio kaj ilia ĉiela naturo.***

Ĉiuj SUS-kursoj daŭros ekde lundo, la 30a de aŭgusto, ĝis la 2a de septembro kaj estos prezentitaj en la Internacia Lingvo (Esperanto). La finekzamenoj de kandidatoj, kiuj aspiras agnoskon de sia jam aliloke akirita sciencista grado aŭ celas originalan akiron de scienca grado ĉe AIS (kun la titoloj bakalaŭro, magistro, doktoro aŭ habilit-doktoro) okazos vendrede, la 3an de septembro en la Respubliko de San Marino.

Samtage en tiu ĉi jaro okazos elektoj de la senato de AIS por la venontaj kvar jaroj. La ĝisnunan rolon en la senato plenumas ĝis la fino de 1999:

Prezidanto: ***OProf. Dr. habil. Helmar FRANK*** (Paderborn)

Vicprezidanto: ***OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*** (Torino)

Senatano pri financoj, direktoro de la financofico kaj trezoristo
***OProf. Bengt-Arne WICKSTRÖM dr.*** (Berlin)

Senatano pri protokolado, direktoro de la protokolofico kaj Senata Sekretario
***ADoc. Joanna LEWOC*** (Göttingen)

Senatano pri ekzamenoj kaj direktoro de la ekzamenofico
***OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*** (Torino)

Senatano pri la akademia strukturo kaj vicdirektoro de la strukturofico
***OProf. Hans Michael MAITZEN dr.*** (Wien)

Senatano pri studado kaj direktoro de la klerigofico
***OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr.*** (Freising)

Senatano pri esplorado kaj evoluigado, kaj direktoro de la sciencofico
***OProf. Carlo MINNAJA dr.*** (Padova)

Senatano pri publikaj rilatoj kaj informado, kaj direktoro de la informofico
***OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER*** (München)

Senatano pri honorado kaj direktoro de la honoradofico
***OProf. Hans Michael MAITZEN dr.*** (Wien)

Senatano pri akademia identeco kaj direktoro de la identecofico
***OProf. Dr. habil. Helmar FRANK*** (Paderborn)

Senatano sen ofico
***OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.*** (Göttingen)

La organizaĵoj subtenantaj agadon de AIS aŭ AIS-klerigejoj troviĝas jam en pluraj landoj, ekz. en Germanio, Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Rumanio, Bulgario, Meksikio, Rusio, probable baldaŭ ankaŭ en Ĉinio.

- *Se ankaŭ **vi** volas aparteni al AIS,*
  - *se vi volas instrui kiel docento ĉe AIS*
    - *se vi interesiĝas pri la studeblecoj ĉe AIS,*
      - *aŭ se vi ŝatus mone subteni la akademion (iĝante ĝia subtena membro),*

*bv kontaktiĝi kun la Senata Sekretario, Joanna Lewoc (Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen, blewo1@hrz.uni-paderborn.de).*

Pliajn informojn pri AIS vi povas trovi ankaŭ en la interreto sub la adreso: *http://www.forst.uni-muenchen.de/OTHERS/AIS*

## Aliĝo al la 21a SUS

Por aliĝi bonvolu uzi la kunmetitan SUS21-aliĝilon. La aliĝkotizo ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio estas nur 40,– DM. Anoj de AIS povas pagi per sia bonhavo ĉe AIS. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj posedantaj validan studentan legitimilon de AIS estas liberigitaj de la aliĝkotizo ĝis unu monato antaŭ la okazigo de la AIS-studadsesio. (La studenta legitimilo estas akirebla kontraŭ 65 DM, validas ĝis la atingo de la koncerna studadcelo, sed ne pli longe ol 5 plenajn kalendarajn jarojn, kaj estas havebla ankaŭ dum la sesio mem. Interesitoj bv. disponigi sian aktualan foton.)

Bv. atenti, ke la aliĝkotizo ne kovras ekzamenkostojn, kurskotizojn, tranoktkostojn ktp.

**La aliĝo rajtigas vin**

- ✓ senpage (sen rajto ekzameniĝi) partopreni ĉiujn kursojn, prelegojn, ekzamenigojn *(por ricevi kursateston necesas enskribiĝi al kursoj aŭ prelegserioj; la enskribiĝkotizo al unu kurso estas ĉ. 40.- DM),*
- ✓ senpage partopreni publikajn oficialaĵojn kaj ĉiujn erojn de la kadra programo, kiuj ne estas aparte pagendaj
- ✓ ricevi la programkajeron kaj fine de la sesio partoprenantarliston,
- ✓ ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon.

## Loĝado kaj alveturebloj

Tranoktado estas memstare aranĝenda. Ĉe la sesiejo ekzistas pluraj hoteloj, ili estas bonkvalitaj kaj situas tre proksime al la marbordo (100-200 m). La hotelprezoj por kompleta tag-pensiono por unu persono estas tre favoraj (ĉ. 50.000- 60.000 italaj liroj). La hoteloj estas atingeblaj de la ĉefa stacidomo en Rimini per buso kaj mallongdaŭra piedirado.

Ankaŭ al la Respubliko de San Marino, kie okazos la vendreda programo, regule kursas busoj inter tiuj ŝtatoj.

## Rimini – la urbo

San Giuliano Mare, kvartalo en kiu okazos SUS, havas belan plaĝon, taŭgan por kunvojaĝantaj familianoj aŭ paŭzoj en la programo. La centro de Rimini foras nur ĉirkaŭ unu kilometron kaj posedas historiajn vidindaĵojn. La urbo estas fondita de romianoj kiel „Arminium“ en 286 a. K. La regadon transprenis poste Ostrogotoj, Bizancanoj kaj Lombardoj. De la mezepoko ĝis al la Renesanco regis la Familio Malatesta, kiun postsekvis la Vatikana Regno, la Napoleona uzurpemo, la unuiĝinta Italio... Arto kaj arkitekturo de Rimini havas do sian plurjarcentan riĉan historion.